Baldaŭ post liberiĝo de nia lando starigis nia Asocio Radio-komisionon kun s-o Adolf Malík kiel estro kaj turnis sin al direkto de ĉeĥoslovaka Radio kun propono uzi Esperanton por informado de fremdlando pri politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj aktualaĵoj de nia ŝtato. Dank' al larĝvida kompreno de la Radio-estraro la propono estis akceptita kaj la Stacio Praha disaŭdigas lundon kaj jaŭdon sur mezaj ondoj kaj ĉiutage sur mallongaj ondoj. Similan sukceson havis E. Klubo en Mor. Ostrava, el kie oni disaŭdigas sur mezaj ondoj ĉiun mardon. La mezondaj disaŭdiĝoj estas krom tio je nia dispoŝo por informoj priesperantaj kaj organizaĵaj ankaŭ en ĉeĥa lingvo.

Dum la jaro 1945 parolis sur mezaj ondoj Malík 9 foje, Hromada 6, Slanina 6, Eliášová 3, Dr. Weirych 2, Echtner 2, Forge, Silagyi, Ivone, Mařík, Borovka, Valeš, Benda unufoje.

Temoj de prelegoj estis:

17. 9. Malík: Enkonduko (ĉeĥe kaj esp.).
20. 9. Malík: T. G. Masaryk (datreveno 14. 9. 1937).
24. 9. Hromada: Nia subtera movado.
27. 9. Benda: Pri Esperanto-kursoj en Radio (ĉeĥe).
1. 10. Malík: Informoj pri aktualaĵoj.
4. 10. Echtner: Kotraŭgermana diĝo en Ĥodujo.
8. 10. Hromada: Antaŭ sep jaroj.
11. 10. Malík: ŬRO kaj federacio sindikata en Parizo (ĉeĥe).
15. 10. Forge-Slanina: Intervjuo kun franco.
18. 10. Malík: Centra Estraro Sindikata kaj Sindikata federacio en Paris.
22. 10. Szilagyi: Perfido de demokratio.
25. 10. Dr. Weirych: Ekonomia konstruado de CSR.
29. 10. Malík: La unua respubliko (28. 10.).
1. 11. Staněk (Hromada): Revolucia Sindikata movado (ROH).
5. 11. Ivone de Petry-Slanina: Intervjuo kun franca dancistino.
8. 11. Slanina: Filma industrio en ŝtatan posedon.
12. 11. Mařík: Tragedio de 17. 11. 1939.
15. 11. Hromada: Argumentoj por ŝtatigaj dekretoj.
19. 11. Echtner: Luzacio.
22. 11. Malík (Eliášová): Momentbildoj el la studenta kongreso.
26. 11. Ŝustr: Bonhumorajo dum la milito.
29. 11. Malík: Kongres-finalo.
3. 12. Dr. Weirych: Ekonomiaj rilatoj kun Svedujo.
4. 12. Malík: Skandinavia centralo.
6. 12. Slanina kaj trupo: Sankta Nikolao.
7. 12. Hromada: Esperanto-Svedujo kaj ni.
10. 12. Ing Hons (Malík): Cent jaroj de fervojo Olomouc—Praha.
13. 12. Hromada: Kio nova en ĈSR I.
17. 12. Borovka: Pri L. L. Zamenhof (15. 12.).
20. 12. Slanina-Eliášová: Interparolo kun partizano.
27. 12. Hromada: Kio nova en ĈSR II.

Sur mallongaj ondoj komencis disaŭdigado esperantlingva la 24-an de septembro per paroladoj de Kamarýt kaj Malík, kaj ĝi estas daŭrigata ĉiutage, 15 minutojn, 12 minutoj estas prelego, 3 min. muziko. Ĝis fino de decembro parolis sur mallongaj ondoj: Malík 56, Hromada 42, Valeš 7, Eliášová 6, Echtner 2, Kaukušová 2, Jeřábek 2, Mařík 2 foje.

La resonado de nia disaŭdiĝo estas tre granda.

Laŭ la ricevitaj korespondajoj Radio Praha estas aŭskultata ĝis nun en 11 landoj: Svedio, Britlando, Danujo, Nederlando, Francio, Belgio, Svislando, Polujo, Norvegio, Finnlando kaj Bulgario.

Pluraj profesiaj aktoroj kaj operkantistoj en Praha lernas nian lingvon. Tio estas preparo por radiosendado de teatraĵoj, operoj, operetoj kaj kantoj en Esperanto.

Multaj samideanoj en Eŭropo estas ankoraŭ sen regula kontakto kun la Esperanto-movado pere de Esperanto-gazetoj. Pro tio Radio Praha elsendos »Esperantan Radio-Revuon de Praha« ĉiun unuan jaŭdon en la monato je la 22a horo 50 minutoj sur ondo 470 m kun diverslandaj informoj pri interesaj kaj gravaj novaĵoj pri Esperanto, ĝia movado, gazetoj kaj libroj. Jam ni ricevis du librojn por radio-recenzo. Urgaĵ informoj estos sendataj kiam ajn en nia lunda kaj jaŭda disaŭdigado.

La nunaj ondoj kaj tempoj de Esperanto-sendado Radio-Praha:

- a) ĉiutage (ankaŭ dimanĉe) de la 22,30 ĝis 23 horo sur mallonga ondo 49,92 m: Informa servo pri la vivo en Ĉeĥoslovakio (arango de la stacio),
- b) ĉiulunde kaj ĉiujauĉe de la 22,50 ĝis 23 horo sur meza ondo 470 m: prelegoj, intervjuoj, teatraĵ scenetoj, kantoj (arango de la Asocio),
- c) ĉiun unuan jaŭdon en la monato (do 7 Febr., 7 Marto, 6 Apr., kpt) de la 22,50 ĝis 23 horo sur 470 m: »Esperanta Radio-Revuo de Praha«, informoj pri nia movado (arango de la E-o-Movado).

Ĉiuj ĉi disaŭdiĝoj estas ofte (ne ĉiam!) sendataj ankaŭ sur longa ondo 1571 m.

Moravská Ostrava disaŭdigas ĉiumarde (meza ondo 325,4 m, 922 kc) de 22,20 ĝis 22,30 horo.

Aŭskultu kaj konfirmu aŭskulton ankaŭ de tiuj ĉi stacioj fremdaj:

Warszawa ĉiulunde (mallonga ondo 49,06) je la 23,00—23,15 horo. Aŭskulton konfirmu al Radio Pola, Koszykowa 8.

Sofia ĉiumerkrede (meza ondo 352) je la 17,00 horo.

B. N. R. O. Kortrijk (Belgio), ĉiŭvendrede (meza ondo 202,3 m), je la 21,30—21,45 horo. Aŭskulton konfirmu al Zender Kortrijk van de B. N. R. O. Rijsselstr. 36, Kortrijk.

UNUECO ESTAS FORTO - ESPERANTO BONA SORTO!

alilandaj esperantistoj. La tieaj esperantistoj sukcesis jam interkonsenti kun la Radio en Praha, kie oni ĉiuvespere dissendas 10-minutan programon en Esperanto per mallonga ondo. La ĉeĥoj cetere proponis al nia federacio, ke ni organizu en Svedlando vojaĝon por granda ĉeĥa kantistaro konsistanta el 60 personoj. Tiu propono bedaŭrinde estas malfacile efektiviĝebla. Venis ankaŭ letero de s-o Forge-Fetke, kiu nuntempe loĝas en Praha. Li skribas, ke la ĉeĥa ŝtato verŝajne eldonos propagandfilmojn en Esperanto pri tiu lando... (Svesnka Esperanto-Tidningen, okt. 1945.)

La verda flamo. Oficiala organo de Maroka Esperanto-Asocio. Aperas depost januaro 1945 en Casablanca, rue Savorgnan-de-Brazza kaj kostas enlande 60 frankojn, eksterlande 15 respondkuponoj. Ĉi estas ciklostilita, 10 paĝa. Ni legas en numero el novembro en artikolo »Verdaj apostoloj«: Unco de Esperanto-uzado valoras tunon de parolajo pri E-statistiko negrave kion impone la ciferoj signifas por la jam-konvikito. Ke la Franca ĉambro de komerco en 1939 favoris Esperanton ne impresas multajn kapojn tiom, kion impresas aŭdo de pura Esperanto-parolo ĉe la koncerna propagandisto. Ke Romain Roland kaj Henri Barbusse amike sintenis al Esperanto pezis malmulte kontraŭ tio, ke nek unu nek la alia povis eĉ uzeti ĝin. Jen tragedio en propaganda kampo. Tro tro da niaj agemaj amikoj malfaras sian pene suferan laboron per la embarasa montro, ke ili ne povas uzi la lingvon buŝe kaj skribe en maniero postulata de siaj alteflugaj pretendoj, ke Esperanto estas simpla, facile lernebla kaj ĉiamaniere taŭga en la homaj rilatoj.

Semu konstante estas nova ciklostilita monata organo de Esperanto-Instituto »Malnova Turo« aperanta en Eindhoven, Venkelstraat 15 (Nederlando). En novembro 1945 aperis jam 14-a numero (4-paĝa) en Esperanto kaj nederlanda. Ĝi enhavas artikolon pri »Esperanto-Mond-Orgazino (EMO)« de R. Delpasko. Ĝi konsilas malaltajn kotizojn, tuŝajn publikigad-rimedojn. Ne valoras la kosto de papero por ripetadi tiajn antaŭmilitajn naivajojn. Ni ja havas da diskutado pri organizo sufiĉe. Ĉiu aliĝu al sia nacia asocio kaj sekvu ĝiajn konsilojn.

Unua postmilita kongreso ĉeĥoslovaka.

Amika kunesto

sabaton la 19-an de januaro 1946 kunvenigis je la 20-a horo en klubejo de kafejo Louvre 85 kongresanojn. La kunvenon prezidis Dr. Stan. Kamarýt, la temo de tre vigla diskutado estis renoviĝo de la poresperanta laboro en la tuta respubliko. Oni diskutis precipe pri la kotizo, ĉar ĝi nepre estas altigota pro kresko de ĉiuj prezoj. La granda plimulto de ĉeestantoj venis al la konvinko, ke aĥono de la asocia gazeto devas esti enkalkulita en la kotizo. Tial oni devos postuli 60—70 Kĉs. Kelkaj eĉ proponis 100 Kĉs.

La humoro de la kunveno estis tre edificanta. Ĉiuj estis plenaj de entuziasmo kaj de firma kredo, ke venas epoko por esperanto tre esperplena.

AGADO DE LA KONGRESO

en Praha en salono de kafejo Louvre, la 20-an de januaro 1946, je la 10.00—13.10 horoj.

Ĉeestis 105 personoj el sekvaj lokoj: Benátky n. J., Brno, Doksy, Dol. Bousov, Hradec Králové, Chodov u Kar. Varů, Chotěboř, Jaroměř, Kladno, Klatovy, Litoměřice, Mor. Ostrava, Olomouc, Pardubice, Plzeň, Praha, Přelouč, Slezská Ostrava, Sobotka, Tábor, Třebovice, Zlín, Zlonice, sume 23 lokoj.

La prezidanto malfermis la kongreson kaj salutis la ĉeestantojn precipe akcentante grandan nombron de reprezentataj lokoj. La kongreson poste salutis delegito de Centra Estraro Sindikata (ŪRO) Frant. Staněk, kiu akcentis la fakton, ke ŪRO kiel la unua publikjura korporacio deklaris pozitivan sintenon koncerne Esperanton kaj enmetis ĝin oficiale en programon de siaj Labor-lernejoj. Delegito de Cs. Radio Adolf Malik konstatis la resonon, kiun havas la Esperanto-disaŭdigoj en fremdlando, kaj la kreskon de la pozicio, kiun Esperanto akiras pro tio ĉe Radio-estraro. La prezidanto dankis lin. Delegitino de Komitato de Ĉeĥoslovakaj Virinoj (Rada ĉeskoslovenských žen) F. Vítová-Něsměráková deklaris aprobon de nia celado kaj promesis subtenon fare de sia unuigo. Poste salutis la kongreson Jaroslav Šustr (E. K. en Praha) Stanislav Lešinger (Skolta Ligo Esp.), J. Pech (Laboristaj turistoj en Plzeň), Vladimír Slaný (E. K. Mor. Ostrava kaj Radvanice), J. Pelcman (»Kulturo« Plzeň kaj SAT), Fr. Kavan (Okcident-Bohemaj Esperantistoj en Plzeň), Maxmilián Gabzdyl (E. K. Litoměřice), J. Vondroušek (E. K. Brno), Sáva Heřman (E. K. Pardubice), Fr. Pytloun (E. K. Hradec Králové), Karel Škrobák (E. K. Slezská Ostrava).

Salutleteroj kaj telegramoj legitaj de sekretario J. Šustr venis el jenaj lokoj: Bohdaneč (A. Grosmanová-Vamberová), Baťovany (grupo esp.), Bojkovice (J. Tichoň), Bratislava (VI. Jukl), Ĉes. Budějovice (Klubo), Dvůr Králové n. L. (prof. J. Filip kaj 10-a grupo skolta), Hradec Králové (geedzoj Lukáč, J. Vitek), Holešov (Krumpholc, prof. F. Růžička), Hartvíkovice (F. Sedláček), Hont. Tesáry (J. Moliš), Cheb (R. Bystřický), Karlovy Vary (F. Mílek), Kmetiněves (B. Bricháčová), Liberec (B. Novotný), Litomyšl (grupo esp.), Litoměřice (Dr. J. Černý), Míchálany n. Tor. (Š. Sninčák), Michle (J. Černý), Nová Huť p. Niž. (O. Knobloch), Plzeň (Okcidentbohem. esp.), Polička (prof. M. Žahourková), Poličná (grupo esp.), Radimovice (J. Holina), Radvanice ve Sl. (E. K. Nova vivo), Roudnice (F. Kučera), Semily (M. Votočková), Sychrov (Z. Roubíček), Šternberk (Harna), Šumperk (K. Hutař), Tábor (Inĝ. L. Krajčic), Trenčín (E. Rondo, prof. E. Tvarožek), Turč. Sv. Martin (J. V. Dolinský), Týn n. Vlt. (J. E. Slávek), Třebíč (prof. T. Kilián), Těšetice (S. Otruba), Těpeře (A. Novotný), Uh. Hradiště (R. Vilémová), Ústí n. L. (hispana esp. J. Rovira), Val. Meziříčí (V. Šob), Veleň (J. Mareš), Velké Hamry u. Tan. (geedzoj Jakoubě), Vodňany (E. Klubo, J. Vítovec), Zlatá Idka (I. Sedlák).

La prezidanto prezentis proponon de la komitato sendi saluttelegramon al prezidento Beneš. Akceptita kun aplaŭdego.

Saltutletorojn al ministerioj lerneja kaj de informoj proponis A. Malik. Akceptita ĉiesvoĉe.

Poste la prezidanto rememorigis la longajn vicajn de *mortintaj* ĉeĥoslovakaj esperantistoj, multaj inter ili en koncentrejoj kaj ekzekutejoj germanaj. En nia organo aperos ilia listo, en la kunveno estu nomitaj almenaŭ tri nomoj plej karaj: *Rudolf Bloch*, nia lasta ĝenerala sekretario, la nenian lacigebla helpanto kaj instiganto. Li ne revenis el koncentrejo. *MUDr. J. Marek*, kuracisto en Mladá Boleslav, konata filantropo, mortis en koncentrejo. *Inĝenero A. Slavik*, direktoro de Radio-stacio en Brno, kies kompreno kaj iniciatemo ebligis enkondukon de Esperantoprogramoj kaj estigon de la »Vedra stacio«, estis senkapigita de germanoj en Berlino. Rememorigo de ĉiuj estis honorigita per duminuta silento de stariĝinta ĉeestantaro.

Pluraj esperantistoj travivis epokon de okupado en koncentrejoj, sed revenis, kelkaj malsanaj, kelkaj sanaj. Ili ĉiuj estu salutataj. Ni klopodos fari nomaron ankaŭ de tiuj ĉi martiroj. Tie ĉi estu gaje salutataj ĉeestantaj samideanoj R. Hromada kaj Oto Ginz. La salutajn vortojn de prezidanto sekvis gaja brua aplaŭdo de ĉeestantaro.

Meritas ankaŭ konstati, ke morala sinteno de ĉefaj esperantistoj dum la okupado estis tre bona. Esceptoj estas rimarkinde malmultaj. Sole J. V. Šamla el iama TRAKT trovis utile doni siajn servojn redaktoraĵojn de germanoj kaj estis nun de la Nacia tribunalo en Brno punita per 14 jaroj de malliberejo. Kontraŭ tiu bedaŭrinda kondamninda staras faktoj de kontraŭgermana kuraĝo kaj persistemo. J. Šupichová sciis malakceptadi plurfoje inviton de tiama Radio por legi prelegon laŭdantan la nacisman »reformadon« de ĉeĥa lernejo. Aleš Berka en Brno estis prirabita fare de gestapo de tuta stoko de sia eldonejo de »Malkaraj libroj«, J. Buhr travivis plurfojan esplorado de sia loĝejo kaj pridemandadon sovaĝan en gestapa palaco, J. Šustr sukcesis la Klubon de Praha igi viveti kaj savi antaŭ gestapo la havaĵojn kaj la bibliotekon de la Klubo.

I. Poste la prezidanto raportis pri la *ĝisnuna agado de la Asocio*. La sindono de kelkaj komitatanoj precipe de Fr. Slavik, kiu meritas apartan dankon, ebligis tuj post la liberigo de la lando ekirigi la novan organizadon de la poresperanta laboro. Temis precipe pri sekvaj fakoj.

1. *Ekzisto de la Asocio*. Kiam germanoj invadis nian landon, ili proklamadis, ke la loĝantaro volonte akceptas la ideologion nacisman kaj adaptiĝas al ĝi. Guste tial ni ne volis imiti esperantistojn Aŭstriaĵoj kaj esperantistojn germanajn en Ĉeĥoslovakujo, kiuj tuj post alveno de Hitleranoj ĉesigis ĉian agadon kaj likvidis siajn organizojn. Ni decidis atendi malpermeson fare de germanoj. Tial ni limigis en Protektorato nian agadsferon sole al ĉeĥoj en Protektorato kaj daŭrigis la agadon. Ni aperigis ankoraŭ du kajerojn de la Ligilo 25. VIII. kaj 25. XI. 1939. La lasta numero de la jarkolekto 1939 estis jam kompostita, kiam en marto 1940 venis en nian oficejon du gestapanoj kaj deklaris al ĉeestanta nia oficisto J. Bárach, ke la oficejo estas de ili fermata, ke estas al li kaj al komitatanoj malpermesite eniri en ĝin. Kiam poste nia tiama prezidanto Josef Friedrich havis kuraĝon veni al gestapo kaj demandi ĝin, kial oni fermis nian oficejon, kiun ni ja bezonas por disvolvi nian agadon, pri kies malpermeso ni nenie ion legis, estis al li ĉe dua vizito dirita ordono likvidi tuj la asocion. Por likvidiĝaj celoj oni malfermos por difinita tempo la oficejon. La ordono estis klara. Tial ni kunvokis la likvidan kunvenon kaj la likvidiĝo estis akceptita la 3-an de novembro 1940. Estis elektita likvida komisiono. Ĝi anoncis al la polico la likvidiĝon de la Asocio, sed la laboron likvidiĝan prokrastis. Ĝis nun la likvidiĝo ne estis finita. Tial restis en nia konto la sumo de ĉ. 5000 Kčs. Sed la stoko de libroj devis esti disvendita, ĉar la ejojn ni estis devigataj maldungi. Ĉar la likvidiĝo okazis pro ordono de gestapo, ni rajtis repreni laŭ koncerna prezidenta dekreto nia agadon kaj ministerio de interno laŭ nia petskribo el 22. VII. 1945 tion konfirmis per sia dekreto el 25. VIII. 1945 N-ro IV-3111-21/8-45-7. Ni estas do restariĝitaj kiel Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko, kies statuto estis aprobita per dekreto de min. interna el 7. IV. 1937 N-ro 16717/1937. La nuna kongreso estis kunvokita laŭ tiu ĉi statuto. Ĉiuj membroj ricevis presitan invilon, do la kongreso estas decidrajta.

Dankon Praha! Ĉiusemajne — preskaŭ ĉiutage — niaj ĉefaj sami deanoj dissendas Esperanto-programon. Estas granda ĝuo aŭskulti. La mezeŭropa ondo 260 estas plej bone auskultebla: lunde kaj jaŭde je 22.20 (sed ofte komenciĝas nur je 22.30). Svenska Esperanto-Tidningen, dec. 1945.)

Ĉu tutmonda demokratio? — Tute ne harmonias kun la novaj ideoj, ke ekzemple en brita Hindujo, lando dudekoble pli granda ol Anglio, la oficiala parlamenta lingvo estas la angla, komprenata nur de intelektuloj, kiuj kompare kun la ducentmilionoj da enloĝantoj estas kvazaŭ kelkaj akveroj en maro. —

La situacio en la cetera mondo prezentas la saman bildon kiel ĉi supra. La interesoj de la laboristoj samas, sed tiuj interesoj estas defendataj, sed pli ofte atakataj, nur de diplomatoj, de la lingvokonantoj. Per Esperanto tio povas ŝanĝiĝi, per nia universala lingvo ni povas senpere interrilati kun niaj samklasanoj. (Laborista esperantisto, julio 1945.)

Kelkaj citaĵoj el leteroj venintaj al Centra Dana Esperantista Ligo.

En la okazinta SAT-kunveno de la 2-a septembro, la prezidanto sciigis al ni, kion la danaj esperantistoj faris por la nederlandaj Esperantistoj. Ankaŭ mi apartenis al la feliĉuloj, kiuj ricevis paketon da manĝaĵoj, kaj ĝustloke ĉar mi nun la terura tempo preskaŭ malsatmortis, precipe la lastajn monatojn. Mi ne plu povis supreniri la ŝtuparon de mia domo, tiel rigidita mi estis pro malsato. Mi do dankas al la danaj esperantistoj, ke ili per sendita manĝaĵo helpas min resanigi. J. v. d. Plas, Rotterdam Z. — Hieraŭ mi ricevis Vian paketon. Multan, multan dankon. La enhavo estas tre bona. Helen A. Buis, Hoofilse a/B. — Mi persone dankas Vin kaj ĉiujn Esperantistojn en Danio, kiuj kolektis tiujn bonajn varojn. Mi ne forgesas, kion la danaj esperantistoj faris por ni. Adolf Hock, Rotterdam S. — Per tiu-ĉi mi havas la agrablan taŝkon esprimi nian koran dankon mome de la okcidenta kvartalo tria sekcio Rotterdamo, por la al ni senditaj nutraĵoj diversspecaj. Ni vere ĝojas pri tio, ĉar laŭ nia opinio ĝi estas vera pruvo de solidareco inter esperantistoj ĉiulandaj. Jacq. V. Dupain, Rotterdam. — Ni ĉiuj alte taksas la simpatian geston de niaj danaj amikoj kaj ni certe

ne facile forgesos tion. L. Pelgrim. — Ni kore dankas Vin ĉiujn pro la de Vi senditaj varoj. Kiam ni mont-ris ĉion al niaj najbaroj, ni estis li-eraj, ke ni povis diri: Jen, tion do-nacis al ni la danaj geesperant-istoj. B. v. d. Wal. — Estas vere kortuŝe, ke niaj daniaj geamikoj tia-maniere pensas pri ni. Ni rakontas multe al niaj konatoj, kion la Espe-ranto-Movado faris por ni. C. le Noble. (Dansk Esperanto-Blad, No-vembro 1945.)

American Esperantist venis kun duobla numero por sep.-okt. 1945. Tre eleganta kaj multampleksa ka-jero, duonparte angla. Ĝi komencas per represo de la artikolo de pro-fesoro Björn Collinder pri Mond-lingvo problemo (The Word Lang-uage Problem). Gvidanta artikolo estas tre necesa kritiko kontraŭ IALA, International Auxiliary Lan-guage Association, kiu post mult-jara laborado kiel konsilanto je ling-vaj demandoj nun lasas sian objek-tivan rolon kaj provas prezenti no-van helplingvon »Schematic E« kaj »Schematic K«, unu el ili kun fone-tika literumo. Kiu, ni ne scias — kaj ne trovas necese ekscii. (Svenska Esperanto-Tidningen, dec. 1945.)

Post longa dormado ni ree forĝu la ĉenon. Majo 1945... Tiuj, kiuj nin atakis; tiuj, kiuj semis la morton en nia lando; tiuj, kiuj nin suferigis, fine estis venkataj.

Jam de Septembro 1944, la plej granda parto de nia landa teritorio estis liberigata, sed la monatoj, kiuj estis sekvantaj, ankoraŭ alportis al multaj inter ni plej gravajn batojn.

Ni pensas pri tiuj, kiuj falis en la rangoj de la Rezistant-organizacioj, en la rangoj de nia juna renovigita armeo, aŭ kiuj estis mortigitaj de la bomboj en Antverpeno kaj Lieĝo kaj dum lasta atako de la malamiko en la Ardenoj; pri tiuj, kiuj ĉion perdis per tiu lasta buĉiga bombardado sencela de niaj plej belaj regionoj.

Tuj la estraro de nia Reĝa Belga Ligo Esperantista ekzamenis la situ-acion, interrilatis kun la grupestroj, sed la vivcirkonstancoj en multaj urboj de nia lando ankoraŭ estis tiaj, ke ĝi devis prokrasti la alvokon, kiun ni hodiaŭ direktas al ĉiuj an-taŭmilitaj Esperantistoj.

Dum la tuta milito, nia movado fakte stagnis... Tiuj, kiuj okupis nian landon ne ŝatis Esperanton. La tuta estraro de nia Ligo havis la viziton de la Gestapo kaj ĉe kel-

2. *Agado organiza.* Ni eldonis 4 cirkulerojn, kiuj enigis ordon kaj vi-von en vicajn de esperantistoj. Ni aperigis presitajn aliĝilojn. Rezulto estas ĝis fino de decembro 1945 766 membroj, kiuj pagis kotizon laŭ-volan de K 16, ĝis Kĉs 50.— Venis ankaŭ donacoj, kelkaj sumoj respektindaj (du po mil Kronoj).

3. Ni turnis nin al *IEL* (Londono), *UEA* (Genève), *SEU* (Moskvo), al naŭ naciaj societoj (Brita, Franca, Belga, Sveda, Dana, Nederlanda, Brazila, Svisa, Pola) informante ilin pri nia nuna situacio kaj petante pri iliaj sciigoj. Ni ricevis en diversaj intervaloj leterojn kaj presajojn, kiuj donis al ni informojn pri stato de movado en diversaj landoj. Ĉi oni konstatas reviviĝon.

4. *Centra Estraro Sindikata (ŬRO)* enmetis esperanton en instruplan-on de siaj Labor-lernejoj. Tio signifas tre valoran rekonon de Espe-ranto fare de grava publikjura aŭtoritato kaj la estraro de ŬRO mer-itas dankon pro sia larĝvida decido.

5. *Radio.* Stacioj en Praha kaj en Moravská Ostrava enkondukis uzon de Esperanto por disaŭdigo de informaj prelegoj pri nia ŝtato. El Pra-ha oni disaŭdigas esperantlingve sur mallongaj ondoj ĉiutage, sur me-zaj ondoj dufoje semajne, el Mor. Ostrava unufoje semajne. Ni kreis apartan Radio-komisionon kun ad. Malík kiel estro. Lia detala raporto estas enpresita en la kroniko. Al iniciatemo de s-o Malík apartenas aparta danko. Ankaŭ samideanoj en Mor. Ostrava akceptu dankon de ni ĉiuj pro ilia persisto kaj oferemo. La prezidanto konstatis la streĉon, kiun la laboro de la Radiokomisiono postulas de siaj anoj, ĉar ili devas liveri regule kaj rapide tradukojn de tekstoj ne ĉiam tre facilaj. La kongreso decidis esprimi al estraro de Cs. Radio dankon pro ĝia kom-preno de rolo de Esperanto en ĝia agadsfero.

6. *Gazetaro* ĉeĥoslovaka ne estis tro kompleza al ni komence. Tameŭ persistemo de niaj kunlaborantoj kaŭzis aperigon de diversaj informoj pri Esperanto. Dum la jaro 1945 aperis 85 artikoletoj. La unua el ili estis en *Jiskra* (7. VI.). Por helpi al la kunlaborantoj ni aperigis 3 cir-kulerojn por gazetara servo. Iliaj artikoloj estis represataj kontentige. Sumo de presitaj linioj estis 2397. En *Jiskra* (Třebíč) estis el tio 780 linioj. La plej grandan nombron de artikoletoj havis Ĉin (Brno): 18. Kolektoj de eltranĉaĵoj plaĉe aranĝitaj de s-o J. Mařík kaj de Pavel Kamaryt estis prezentitaj al la kongreso kaj trovis ĝeneralan aprobon.

7. *Lernolibroj kaj vortaroj* estas elĉerpitaj. Estas ricevebla sole lerno-libro de Seppik. Pri tio estos anonco en nia organo. Sed estas jam ver-kataj novaj vortaroj kaj lernolibro, kiujn la Asocio eldonos tuj, kiam ĝi ricevos paperon. ŬRO jam petis pri ĝi ĉe Informministerio, ĉar temos pri lernolibroj por ĝiaj lernejoj.

8. *Asocia organo.* Ni sendis jam petskribon al la Informministerio. La permeso estas jam promesita.

9. *Al IEL ni aliĝis* kaj nia komitatano Jar. Šustr estas nomita ĉefde-legito por Ĉeĥoslovakio. Ni klopodos, ke ni vaxhu decan nombron de individuaj IEL-membroj. Kotizojn por UEA enkasigados ĝia peranto Fr. Slavík. Ni perados ankaŭ enkasigon de SAT-kotizoj.

10. *Membra kotizo.* Post tre detala diskuto ĉiuj ĉeestantoj esprimis deziron, ke la kotizo enhavu ankaŭ la liveron de la asocia organo »Espe-rantista«. Ĉar mankas ankoraŭ oferto de presisto, la kongreso komisiis la elektotan komitaton fiksi la prezon de la kotizo kaj de la abono.

11. *Kasaj aferoj.* Josef Friedrich raportas, kiamaniere li sukcesis post plurhora esplorado konvinki gestapon por malfermi la asocian oficejon kaj forporti el ĝi diversajn dokumentojn. La ebleco vendi nian tiaman librostokon donis al ni eblon pagi la asociajn ŝuldojn kaj konservi la 5000 K kiel komencan kapitalon por nuna agado.

La prezidanto ripetis siajn dankojn al ĉiuj kunlaborintoj, kiuj pro siaj oferemo kaj laboremo ebligis akiri dum nelonga tempo kaj situacio mal-facila rezultojn tiom respektindajn. Precipe estu tie ĉi esprimita danko al s-oj Malík, Šustr, Vondroušek, Friedrich, Hromada, Šolc, Slanina kaj la nelacigebla Slavík. Aplauĉoj.

II. *Elekttoj.* Esperantista klubo en Praha sendas en komitaton s-ojn Fr. Čermák kaj Fr. Sviták. Laŭ propono de prepara kunveno de aktivuloj en Praha estas elektataj ĉiesvoĉe aklame: Adolf Malík, Dr. Stan-

Kamarýt, Rudolf Hromada, Emil Zavadil, Josef Hiža, Jar. Mařík, Hed. Nováková, Teodor Kilián, Vlad. Slaný, E. Tvarožek, Rudolf Dočekal, Jar. Jermář, Vuk Echnert, Ant. Slanina komitatanoj. Frant. Kavan, Karel Šolc, Pavel Rosa, Frant. Pytloun, Vlad. Blažek, Josef Friedrich. MUDr. Frant. Vaněk vickomitatanoj. Kontrola komisiono: Bedřiška Řeháková, Ing. B. Molnár, Frant. Buhr. Vicmembroj de kontrol. komisiono: F. Vítová-Něsměráková kaj Jaroslav Hanuš.

III. *Liberaj proponoj.* Elektu sinjorinon *Julie Šupichová honoro membrino.* Akceptita ĉiesvoĉe.

Inviti universalan kongreson en Prahon. La prez. informas, ke la unua postmilita kongreso estos verŝajne en Stockholm 1947. Pri Praha oni jam ankaŭ traktis por iu sekva jaro. La prezidanto instigas pripenson, ĉu ne taŭgus iam kiel kongresurbo Karlovy Vary.

La prezidanto fermas la kongreson.

Prezidis Dr Stan. Kamarýt.

Protokolis A. Tarantíková.

DIVIDO DE FUNKCIOJ DE LA KOMITATO

elirinta el la kongresa elekto okazis en la unua komitata kunveno la 20-an de januaro je la 16 horo en klubejo de E. K. en Praha. Samtempe estis starigita aro de komisionestroj, kiuj gvidos laboron en koncernaj fagoj. Niaj membroj turnu sin al ili sempere, ili plifaciligos la laboron al ni kaj al si.

Prezidanto: Adolf Malík, Praha XI, Karlova 5.

Vicprezidanto: Dr Stan. Kamarýt, Chotěboř 853.

Vicprezidanto: Rudolf Hromada, Praha VII, Sochařská 333.

Gen. sekretario: Emil Zavadil, Praha X, Královská 103.

Sekretario: Josef Hiža, Praha 53, Na dlouh. lánu 419. Telef. 74440.

Sekretario: Jar. Mařík, Praha II, Krakovská 20/I p. u p. Fischla.

Kasistino: Hedvika Nováková, Praha VI, Na Slupí 17.

Komitatanoj: Teodor Kilián, Třebíč, Přebíčov 318, Vlad. Slaný, Moravská Ostrava 9, Třebízského 29, E. Tvarožek, Trenčín, Hurbanova 37, Rudolf Dočekal, Praha II, Žitná 16, Jaromír Jermář, Praha, Záběhlice, Jabloňová 23, Vuk Echnert, Praha, Nusle II, Na veselí 738, Ant. Slanina, Praha XVI, Nádražní 13, Fr. Čermák, Praha X, Žižkova 558, Fr. Sviták, Praha II, V jámě 1.

Vickomitatanoj: Frant. Kavan, Plzeň II, Alešova 2, Karel Šolc, Ml. Boleslav, Železná 41/I, Pavel Rosa, Bratislava, Štefánikova 1, Frant. Pytloun, Hradec Králové II, Riegrovo nám. 1010, Vlad. Blažek, Olomouc, Dvořákova 36, Josef Friedrich, Brno, Na klíncích 8, MUDr. Frant. Vaněk, Dolní Bousov.

Kontrola komisiono: Bedřiška Řeháčková, Praha XI, Tomkova 25, Ing. B. Molnár, Praha I, Náprstkova 9, Frant. Buhr, Praha XVIII, Bělohorská 187.

Vicmembroj de Kont. kom.: F. Vítová-Něsměráková, Praha XIII, Sladkovského 12, Jaroslav Hanuš, Kladno, Švermovo n. 1997.

Komisionoj:

Estro de la Oficejo: Fr. Slavík, Praha 47.

Administrado de membroj: Jan Valeš, Praha II, Na Pořičí 42.

Redakto de la gazeto: Dr Stan. Kamarýt, Emil Zavadil, Vuk Echnert.

Turismo: Josef Hiža.

Radio: Ad. Malík, Rud. Hromada, Ant. Slanina.

Radio en Mor. Ostrava: Vlad. Slaný, Zdeněk Raška.

Libro-Servo: Jar. Šustr.

Literaturo: Dr Tomáš Pumpr, Praha XVIII, Bělohorská 1404.

Tradukoj: Božena Vlčková, Kladno-Dubí, Stránská 110.

Skoltoj: Stan. Lešinger, Praha, Pankrác, Líbušina 34, Fr. Buhr, O. P. Šimon, Lysá n. L. 1183.

ŝakistoj: Dr Václav Faigl, Zlonice, nám. 6.

Virinoj: F. Vítová-Něsměráková.

Akademia-E-Klubo: Jar. Hanuš.

Sciencaj aferoj, Ekzamenoj: Dr Stan. Kamarýt.

Lernejoj: T. Kilián.

IEL-peranto: Jar. Šustr.

UEA-peranto: Frant. Slavík.

Gazetara servo: Zdeněk Raška, Klimkovice ve Sl. 182.

kaj inter ni oni ĉion kunportis, kio rilatis al Esperanto.

Sed post tiu longa deviga dormado ni estis feliĉaj aŭdi, ke ekster Eŭropo kaj en la eŭropaj landoj, kiuj ne estis envolvigitaj en la milito, la Esperanto-movado floradis; ke en kelkaj landoj eĉ la movado kreskis kaj ke nia internacia organizaĵo kalkulas nun pli da membroj ol antaŭ la milito! (Belga esperantisto, decem. 1945.)

Respondo al saluttelegramo de la kongreso.

Kancelaĵo prezidenta republiky.
D-1224/46.

V Praze dne 30. ledna 1946.

Svazu československých esperantistů, Praha XIX, Uralské n. 9.

Kancelaĵo prezidenta republiky tluĉoĉi Vám upřimné díky pana prezidenta za pozdravný telegram, který jste mu zaslali ze svého prvního poválečného sjezdu.

Kancelaĵo prezidenta republiky.
(podpis)

Kabineto de prezidento de la respubliko.

D-1224/46.

En Praha 30-an de jan. 1946.

Al Asocio de ĉeĥoslovakaj esp. en Praha XIX, Uralské n. 9.

Kabineto de prezidento de la respubliko transigas al Vi sinceran dankon de sinjoro prezidento pro saluttelegramo, kiun Vi sendis al li el Via unua postmilita kongreso. Kabineto de prezidento de la respubliko.
(subskribo)

Korespondi kun ĉs. samideanoj deziras:

Roeland de Wiede, Vlierbronstr. 304, DEN HAAG, Nederl.

Vanden Brande Victor, 109 rue Ferd. Lenoir, JETTE-BRUSSEL, Belgie.

Czerniaków Sergiusz, Pruszcz-Gd., Polska.

Ivo Borovečki, ZAGREB, Kamenjak 4 (Kod Mariĉ), Jugoslavija. S-ino Ernst, 106 rue de la Marguerite, UCCLE-BRUXELLES. Se eble en Brno, Belgie.

F-ino Hamelrijck, 19 rue du Pacifique, UCCLE-BRUXELLES, Belgie.

Dominiko Perez Guasp., Chez M-me Ruffié, rue des Rentiers, TARA-SCON sur Ariege, Francie. (kun gejunularo 18—35 jara, prefere instruistino)

Přátelé mezinár. jazyka,

pokud jste tak dosud neučinili, přihlaste se ihned za členy

Svazu esperantistů Československé republiky.

Členský příspěvek pro rok 1946 Kčs 70.—. V tom je zahrnuto už předplatné na svazový orgán »Esperantista«, který dostává každý člen.

Dbejte, aby ve Vašem místě mohl se ustavití místní odbor svazu, což je možno, jakmile je v místě už 8 členů. Místní odbory odvádějí nám z členského příspěvku toliko Kčs 55.—. Jsouce organizováni v našem národním svazu, který je členem

Libro - Servo.

Zajímáte se o esperanto? (Šupichová)	Kčs 6.—
Esperanto a jeho kritikové (Collinson)	Kčs 2.—
Na obranu esperanta	Kčs 2.—
Svaz národů a esperanto	Kčs 5.—
Seppik - Krajc: Systematický kurs esperanta	Kčs 10.—
Julie Šupichová: Esperanto, mluvnice a učebnice. (Po dojití od kniháře.)	
Leĝu kaj parolu (Šupichová)	Kčs 6.40
Aeronaŭtika terminaro (E. D. Durrant)	Kčs 10.—
Armea terminaro (E. D. Durrant)	Kčs 10.—
Filatela terminaro (H. M. Scott)	Kčs 10.—
Terminaro por infan-ludoj	Kčs 10.—
Muzika terminaro (M. C. Butler-F. Marrison)	Kčs 10.—
Radio-terminaro (A. Venture)	Kčs 10.—
Balado pri okuloj de l' hejtisto (Wolker)	Kčs 5.20
Jan Amos Komenský (Novák)	Kčs 2.50
Popi kaj Huhuu (Tuglas)	Kčs 3.—

Píšeme do ciziny.

Poplatky za listovní zásilky do ciziny: Dopisnice 2.40 Kčs, psaní 4 Kčs, dalších 20 g přípl. 2.40 Kčs, doporučeně příplatek 8 Kčs. Letecký příplatek do evropských zemí 1.50 Kčs za každých 10 g, do zámořských států je příplatek odstupňován za každých 5 g a činí ku př.: Alžír 1.50 Kčs, Egypt, Palestina, Syrie 4.50 Kčs, Amerika severní a střední, Australie, USA 12 Kčs, Amerika jižní 15.50 Kčs, Čína 18 Kčs. Váha ietec. zásilek nesmí přesahovati 20 g. — Obyčejné zásilky možno vkládati do schránek zalepené, doporučené zásilky je nutno předkládati u přepážek otevřené; přijímací úředník prohlédne obsah a sám zásilku uzavře.

Internacia Esperanto-Ligo v Londýně,

jsste také organizováni mezinárodně.

Ale radíme Vám důtklivě: Přistupte k IEL též individuálně, abyste dostali Jarlibro (za ročních Kčs 40.—) anebo ještě raději vedle ročenky i měsíčník Esperanto Internacia (za Kčs 90.—).

Příspěvky posílejte na Svaz esperant. čís. pšp. 9.602. Nehodláte-li býti z jakéhokoli důvodu v esperantské organizaci, předplaťte aspoň náš časopis! Roční předplatné je 60 Kčs. Lze je poukázati i pololetně.

Také předplatné posílejte bianko složenkou pšp. (za 15 hal. na každé poště). Vyplňte jméno majitele účtu »Svaz esperantistů, Praha« a číslo účtu 9.602!

Nehodláte-li však náš čas. odebíratí, prosíme *snazně*: vraťte toto číslo!

Tridek jarojn en ora nordo (Welzel) bindita Kčs 41.—

Nokto en Karlův Týn (Vrchlický) Kčs 6.60

Ŝlosiloj: ĉeĥa, slovaka, baska, bulgara, germana, hungara, japana, juda, litova, nederlanda, sudaŝrika : à Kčs 3.—

Leterfolioj kaj kovertoj kun verda stelo kaj surskribo »Esperanto, internacia lingvo«

1 leterfolio kun la koverto 80 helerojn.

100 ekz. , Kčs 60.—

Glumarkoj: 1 folio po 12 ekz. Kčs 1.50

Poŝtkartoj kun Verda stelo kaj vorto Esperanto, 100 ekz. Kčs 20.—

Poŝtkartoj kun plurlingva teksto »Lernu Esp-on!«, 100 ekz. Kčs 20.—

La mendojn sendu sur poŝtsparkasa pagilo de Svaz esperantistů Praha. N-ro 9602.

Uzu bianco-pagilojn riceveblajn ĉe ĉiu poŝto!

Alkalkulu afrankon!

Vortaroj ĉeĥa-esp. kaj esp.-ĉeĥaj estas disvenditaj.

Ni preparas aperon de novaj verkoj.

REDAKCIO PAROLAS:

Ni prezentas la unuan numeron de la asocia organo al indulĝa kritiko. La gazeto turnas sin ankaŭ al ne-esperantistoj, tial ĝi volas havi karakteron de nacilingva gazeto. En venontaj numeroj ne estos la ĉefartikolo tiom longa kaj ni enmetos plurajn rubrikojn novajn, precipe ankaŭ pri la lingvo kaj ni enmetos pli da beletristiko. Ni petas ĉiujn legantojn sendi al ni siajn sugestojn. Kaj ĉiujn aktivulojn esperantistajn informi nin detale pri ĉio, kion ili faris por nia afero. Kaj klopodu, ke ni povu pliampleksigi nian enhavon, se ni havos pli da abonantoj!

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů CSR v Praze 47. Redaktor Dr. Stan. Kamarýt. Tiskem Jar. Strojila v Přerově. Používání novinových známek povoleno výnosem ředitelství pošt v Brně č. j. IA-4-2370-0/37132-15. 3. 46. Dohlédací poštovní úřad Přerov.